


PENSEO

N-ro 273

jul. / 2014

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 25-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Anteo (Ĉinujo)



poluciò nerezistebla

fabrikoj por mamono pentras la ĉielon griza
kaj pro emo la fumantoj, siajn pulmojn nigraj.
nerezistebla la bezono ŝanĝas la manion al naturo
sed sukubo lasas eĉ asketojn farbi sian kalsoneton.



persistado

danke al lupeco de la jaro,
mi perdis la foliojn kaj la sukon.
kun la piedoj en la tero mi ja staras per la ostoj
por subporti aman neston de gebirdoj blindaj.



inter prosperoj mi dancas nuda

mia verdo velkis en printempo.
aŭtuna la ĉielo apartenas al iamaj samklasanoj.
inter prosperoj mi dancas nuda
kontraŭ la ombroj ŝtelfuĝantaj foren.

neatendite

floko de nubo falas teren.
ĝin vergo prenas por belino en kaŝmiro.
la tago akvoatendanta estas longa ol la meza fingro.
bum! bolida fajro la sekecon trafas.



Nazaré Laroca (Brazilo)



Ĉe kafejo

Ĉiu persono estas insul'
el nefinita soleco;
kaj strat' estas river' de l' bruo
kiu ruze batpuŝas
la ostojn de l' tago ...
Mi serĉas rifuĝon en kafejo
eleganta de mia urbo.



Tie tenere akceptas min violonoj
kaj allogas tangon

per dolĉa furiozec';
tiam disfaldas mi paperon,
kiun poezi' bruligas,
por skribi ĉi poemon.


Juiz de Fora, 08/03/2014

Paŭzo


Unusekunde l' eterno
Unuspire enhaviĝas
kaj ĝi la tempon defias.

Kaj la nuda ekzistad'
eniras en la riveron
de l' filozof' Heraklito,
kaj rondodancas sur lun'
el eterna efemero.

Juiz de Fora, 17/04/2014.



Bluegas birdece
mia dezir' je mister' :
miraklo el bel'.



Juiz de Fora, 23/04/2014.

Feliĉo

Poeto trinkas l' intensan
ĝojon de l' infano tiu,
kiu dancas en l'anim',
kaj l' abismon malinventas.




Juiz de Fora, 27/04/2014.

Mori (Usono)





Mortintajn amikojn revidi mi deziris.
Mi do en la sonĝo, la paradizon eniris.
sed en la paradizo ne troviĝis homo.
"Ĉiuj en la infero" Anĝelo al mi diris!



Hieraŭa malamiko hodiaŭ estas amiko
amiko hodiaŭa morgaŭ estos malamiko
homo estas traktata kvazaŭ piedpilko,
Vere amuza estas l' mondo de politiko!





Kiam altrangaj gravKuloj
kaj estimataj gravMuloj
volas konduti kiel
Gravuloj,
mi vidas ilin nur
GravNuloj!
kio estas la problemo
kun miaj okuloj?

Petro Palivoda (Ukrainio)






ĉio blankadas
muroj
plafono
litoj
kiteloj

kaj neĝo ekstere
ĝi baldaŭ ekfalos
***
en tiu ĉi urbo
vi jam ne estas
surstrate veturas
malplenaj tramoj
malfermitajn fenestrojn
eniras vento
kiel fantomo
vagadas pasinto
***
iam en la ĉielo
mi vidis belegan arkon
kaj ne povis deŝiri rigardon
mi tiel volas ĝin ree ekvidi

iam en verda arbaro
mi aŭskultis miraklan birdon
kaj sonis magia muziko
mi tiel volas ĝin ree ekaŭdi

iam mi vidis vin
kaj aŭskultis
***
ni veraj kiam estas
ĉu sataj
ĉu malsataj
ĝemo en abismo
vokokri' de revo
hodiaŭ mi
ĉu mia identul'
malvera
***
mi trankvilas
al foliaro simile
dum malbona vetero aŭtuna
leĝoj de la natur' estas saĝaj
vento blovos
vintro venos baldaŭe
blanka neĝo kovrados
restaĵojn aŭtunajn
venos ree printempo
mi trankvilas
al foliaro simile
dum malbona vetero aŭtuna
nur ke venu printempo morgaŭe
***
ĉi-loke estas centro de la Tero
ĉi-loke estas kerno de la mondo
kaj vojoj
vastaj helaj kaj cinceraj
kaj ĉirkaŭvojoj
fiaj kaj timemaj
eliras de ĉi tie
ni iru en la vivon
mi sursojliĝos ree
kiel iam
mi estas ree hejme
***
vento alportas en polmoj
odorojn de herboj
kion flustradas floroj
en malproksim'
sur ankoraŭ verdetaj ebenoj
rosoj frostiĝas
sur tia vojeto mi iras



***
ĉu mi povas vin iam forgesi
ĉu mi povas forgesi vidi
ĉu mi povas forgesi aŭdi
ĉu mi povas forgesi spiri
certe povos mi vin forgesi
se mi povos forgesi vivi
***
vizaĝo via
sunradias
mi opiniis iam
ke mallum' de nokto
pli malvarmigas
ol silento

kaj ĝi mortigas
revojn niajn
sed
vizaĝo via
sunradias

***

Kiom da fojoj
oni al mi deziris
sanon,
feliĉon
kaj longan vivon.
Mi vivu feliĉa kaj sana
milojn da jaroj.
Sed vi diris:
Sen mi vi ne povos vivi.

***

guteto da akvo
el glacipendaĵo
hieraŭa
falante malsupren
tuŝetis vizaĝon mian
mi estis tiel surprizita
ke en mallibero vintra
nur povis pensi
ke vi revenis



***

en mia koro
estas multaj vundoj
fluas sango
tra verslinioj

***

en subtera transirejo
ludis akordionist'
mi aŭskultis longe
premiĝinte
al malvarma kolono
nenio ŝanĝiĝos
en mondo sen mi
nur en marto
ne komenciĝos printempo
kaj muziko restos
porlonge sopira

***

hodiaŭ
mi haltos duonvoje
silentos duonvorte
ĉi tiu iluzio de feliĉo
rompiĝu morgaŭ
kaj mi malsupreniros
de belegaj pintoj
de Monto Blanka
kie neĝo estas
blindige blanka
en valon
kie malpuraj fluoj
forportas al pasinteco
ne faritajn paŝojn
kaj ne diritajn vortojn



Siv Burell (Svedio)



La steloj subenfalis

Subenfalis steloj brilaj
kiel lumoj en arbar'.
Vidu: anemonoj milaj
el ĉielo en arar'!
Kiom multaj ili estas,
ĉu ne ŝajnas malŝparad'
krei florojn, kiuj forestas
post monato kun festad'?


Mi plukas ilin kun fervor'
portas hejmen en amas'
kaj kun gaja kor',

metas en tre granda vaz'.
Sed neniam plu la blanka lum'
same kiel en arbar'
ĝojigas min la malŝpar'.
Mi hontas, ke troajn plukis mi.



Pentrita de Siv Burell

Paŭlo Silas (Brazilo)



HELPU AL MI, AMIKO

Mi evitos vin per senrimarka eliro,
Per rapida malapero, sen adiaŭdiro.
Kiam pensos vi, ke viaflanke mi staras,
Vi perceptos, ke al nenio mi egalas.

Proksimiĝis mi al vi, ĉar estis vi la ilo,
Kiun uzis mi por venki tiun barilon.
Se profiton donas vi, ĉe vi mi najbaras.
Sed ne pensu, ke vi, konato, specialas.

Ne invitu min por partopreni en via
Amikeco tute aĉa, malinda kaj fia.
Mi toleros vin nur kiam vi tre bezonatos.

Se silentos vi obee, eble mi kompatos.
Okupita nun mi estas kun aliulo,
Diskutante burĝe pri riĉaĵo-akumulo.


Cecilia

Violbukedo

Edzinan vivon ŝi ŝatis fakte,
kvankam ŝia edzo ne kondutis tre takte.
Li agis ofte kun forta karaktero,
kaj ŝi plendis, ke al li ja mankas tenero.
De longe jam, ĉiun monaton,
al ŝi leteras nekonato.
Liaj tekstoj poezias
kaj ŝi, feliĉa, fantazias
Kiu verkis poemojn por ŝi silente?
Kiu sendadis florojn ĉiuprintempe?
Kiu, ĉiun naŭan de novembro
sen klariga etikedo,
sendis al ŝi nepre violbukedon?
Ŝi foje revas kaj eĉ imagas
bildon pri la viro, kiu ŝin amas.
Kaj ŝi preferas bildigi lin tenera,
kun grizaj haroj kaj rideto sincera.
Sen scii kiu do suferas,
kaj en sekreto ŝin amegas,
Ŝi vivas plu, tagon post tago,
ĝuante tiun kaŝan amon.
Kiu verkis poemojn por ŝi silente?
Kiu sendadis florojn ĉiuprintempe?
Kiu, ĉiun naŭan de novembro
sen klariga etikedo,
sendis al ŝi nepre violbukedon?
En la vesperoj, kiam, postlabore,
la edzo venas hejmen, li gvatas ŝin esplore.
Ĉar li scias ĉion, nenion li komentas.
ŝi feliĉas do sekrete li konsentas.
Ĉar estas li la flor-sendanto,
kaj fidela poem-verkanto.
Tamen, ĉar ŝi ne suspektas,
ŝi rigardas lin kaj ŝi plu silentas
Kiu verkis poemojn por ŝi silente?
Kiu sendadis florojn ĉiuprintempe?
Kiu, ĉiun naŭan de novembro
sen klariga etikedo,
sendis al ŝi nepre violbukedon?



Tradukis



Svena Dun (Hispanujo)

Heinrich Heine (1797-1856)



Lorelaj

Min kaptas malgajo de l' koro,
pro kio tiu trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,
malhelas jam la Rejn'.
La monto surpinte brilas
vespere en suna scen'.

Tre ĉarma feino sidas
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

Ŝipisto ŝipeton gvidas.
Lin kaptas ve' pro ekzalt'.
Li ja la rifojn ne vidas',
li vidas nur supren sen halt'.

Mi pensas, ke ondoj tiros
la ŝipon funden de l' Rejn';
kaj tio de l' kant' eliros
de l' Lorelaj-siren'.



tradukis



Cezar (Germanujo)

Shefqete GOSALCI

Sensopiro

La memoro delikate la pipon ekbruligas
La ankron en la ĉefurbo de la forgeso ellasas...
La fumon en la nobelturo eligas

Okulbindita subskribas al la sezonoj la jaro
La novajn pasportojn kun temperatura stampo
kaj akvolimdato
La printempon kondamnas pro la malfruiĝo al
morto

Kaj al la somero nur la ungojn ĝi eltranĉas
Por ke ne malhelpu la sunon
Poste al si la naskiĝtagon nul bonaŭguras

Kun bazilio enmane
Nudpiede marŝas tra la aŭgustaj noktoj kun
lampiro
Kvazaŭ en la unua rendevuo la knabino

La jarcenton orgojligas pro muteco
Kaj manfrapas al la vizaĝo pro malpureco
Kaj la dormopilolojn pro tagkajera perdo
Fordonas la pendseruron de malnova kesto
Kun cidonio ene

Forprenas en la intergenuo kaj la hararon
karesas
Per mamo, kukurbaj semoj kaj olivolio
manĝigas
Per sopiraj vindotukoj envolvas

Kaj alparolas vorton sur la orelo
Kostandin vi subiĝu al Dio kaj memoro
Ankaŭ Zana-n kunprenu
Ekde komenco la sensopirigon startu

Mi alskribas al la animo de la animo per animoj

Kaŝita kristalo mia animo
En la oceano de la ĉagreno
Ŝirita membro de la Patrio
Per la tondiloj de la okupacio

Ŝirita kristalo mia animo
Per la martelo de la allogo
Faldis la jarojn de la pacienco
Kvazaŭ monerojn en la ŝparkaso

Ŝirita kristalo mia animo
Falintaj el la manoj de la skulptisto
La animoj en lampirojn turniĝintajn
Ankaŭ la meteoron lumigintajn

Alskribos ankaŭ Dio
Sur la tagkajero de la homaro
Kiel militis animo dum la vivo
Por serĉi la vojon de la ĝojo

Soldato de la tago mia animo
Ĉirkaŭita per mallumoj
Se vi bezonos por prilumado
Mi donacas ĝin- forprenu, forprenu.



Esperantigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Spektado al kolzofloroj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Junie
En varma sunlum'
zefiro tiklas blove
kiel birda minca plum'
nin per milda rum'.

Sin sternas
vasta mar' en orkolor'
ondanta ĝis senlime —
bela natura dekor'
jen kun bonodor'.

Abeloj
flirtas zumsone
dancante inter florar'
por poleno bezone
nu, ĉisezone.

Ĉielo
hele lazura
kontrastas kun orflavo
en ventpelo susura
kun sent' plezura.


Homoj ja
vagas libere
sur kolzaj kamporandoj
por spektadi senpere
ĉi-eksomere.

Ebrias
koroj de homar',
ĉu pro natura belo

aŭ pro miela nektar'
aŭ pro flava mar'?



Jadranka Miric (Serbio)



Akvomuelejo de morto

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Legendo
diras, malbono
naskas nur remalbonon.
Sciigo pri demono
al ĉiu kono.

Sur Radan ,
en Bojnik valo ,
montara malbenita
sorĉmagia homfalo.
Frenezul' kalo.



Hajdukoj
mortigis homon,
honestan, diligentan.
Kaj forrabis la domon.
Faro de demon'.

Magia
fantoma loko.
Ĝin ŝafaro evitas. .
Sur bela Radan roko
kriaĉa voko.

laŭ la legendo pri malbenita akvomuelejo troviĝanta sur montaro Radan , en la valo de Pusta Reka (dezerta rivero)

Inunda katastrofo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Inundoj.
Ekis terglitoj
post la longdaŭraj pluvoj.
Ho, subakviĝis litoj.
Homoj kaj vitoj.

Lecion'
ja, ege ŝoka.
Ne nur tera sed kosma.
Tutslava krizo, moka.
Enigmo roka.

Atesto
terura, peka.
Forgesitaj bonecoj.
Amrivero tre seka.
Senfrukta, peka.

Lumturo
ekbrilis fine.
Sunleviĝo tra ŝlimo
elakviĝis ni pine,
senlimdifine.

Konkordo!
Interpaciĝo.
Akriĝinta konscio.
Por mensa trankvliĝo .
Kaj korp' saniĝo.

dediĉita al la loĝantaro de inunditaj regionoj de serbio, Respubliko Serbska en Bosnio kun federacio de muzulmanoj kaj kroatoj kaj al la loĝantaro de kroaŭjo. Eĉ en malbono oni povas trovi ion bonan!

**Sopir-al-sudo: (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Beleco

—laŭ ĉinesko Pozhenzi*

Beleco allogas.
Risko ĉiukaze.
Plukitaj peonioj
flaviĝas ekstervaze.
Kondiĉokaze.

Plukita juneco.
Posta ĉagreneco.
Fotoj de pasinteco
karto por eterneco.
Se noblis eco.



**Pozhenzi (Kavalira danco): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)*

Guozhu (Ĉinujo)



MIL AFIŜOJ

— laŭ ĉinesko Dingfengbo*

Post la afiŝo mila —
penado malfacila.
Roboto ekzamenas.
Ĝenas
averto malĝentila.

Spit' al malbona veter',
danĝer',
kiu pruvas turmente,
ni marŝu al verdstelo,
celo,
obstine kaj senpente!

**Dingfengbo (Subigo de ŝtormo): Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj respektive de 7,7;7,2;7;/ 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimarnĝo aabba/ccdeed*

Sero (Ĉinujo)

Trista floro

—laŭ ĉinesko Caisangzi*

Deŝirita de l' tigo
la blanka flor'
kun kor-dolor'
lamentas en trista plor'.

Enŝovita en vazo
ĝi por dekor'
jam velketas
kun restanta bonodor'.



**Caisangzi (Moruskolektanta knabino): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)*

Mandio (Ĉinujo)

Meditado en nubaro

—laŭ ĉinesko Pusaman*

Monton volvas nubaro
kvazaŭ en blanka maro.
Flosas montkapo
en ŝaŭm' de sapo;

svenis verdaĵo
sub pala gazo.
Pejzaĝo svagas,
homoj imagas.



**Pusaman (Budhista dancisto): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo*

Lily (Ĉinujo)

Stupro en hospitalo

—laŭ ĉinesko Shuilongyin*


Mi sur malsanlito
kuŝis kun spirita blu'
deprimite
pro malordo
de la menstru'.
Kun okuloj
fermetitaj
sen ajna bru'
ginekologon
mi atendis
por kurac'
kaj instru'.

Ekis ekzamen' nu.
Io piŝtis
en mia tru'
kvazaŭ kaco
karnoglue.
Jen je eksku'
mi tuj trovis:
vira doktor'
kun likva flu'
ĵus eltiris ĝin
ridetante
pro seksa ĝu'.

**Shuilongyin (Akva drako): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 12 versoj de 67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj, laŭ rimarangô xa,xxa, xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x= senrima)*

Maupassant (1850-1893)





Kastelo de Solles, lundon la 30an de julio 1883.

Mia kara Lucia, nenio novas. Ni vivas en la salono rigardante la falantan pluvon. Dum tiuj aĉaj veteroj ni apenaŭ povas eliri ; tiam ni ludas komedion. Ho, kara mia! Kiom ili estas stultaj, la salonteatraĵoj de la nuna repertuaro. En tiu ĉi, ĉio troigas, krudas, plumpas. La ŝercoj trafas kvazaŭ kanonkugloj, frakasante ĉion. Nenia eleganteco, nek spriteco, nek senafekteco, nek bonhumoreco. Vere tiuj literaturistoj nenion konas pri la mondumo. Ili tute nescias, kiel ni pensas kaj parolas en nia societo. Mi plene permesus al ili, ke ili malestimu niajn morojn, konvenciojn kaj manierojn, sed mi tute ne permesas al ili, ke ili tute ne konas tiujn ĉi. Por ŝajni spritaj, ili kreas vortludojn, kiuj amuzus nur kazernulojn; por aperi gajaj, ili servas al ni spritaĵojn, kiujn ili devis rikolti ĉe la altaĵoj de la ekstera bulvardo, en tiuj bierejoj nomataj de artistoj, en kiuj oni ripetas jam de kvindek jaroj la samajn studentajn paradoksojn.

Fine ni komedias, kaj ĉar ni estas nur du virinoj, mia edzo rolas la servistinojn, kaj pro tio li razis sin. Vi ne imagas, mia kara Lucia, kiom tio ŝanĝas lin! Mi ne rekonas plu lin… nek tage, nek nokte. Se li ne lasu rekreski senprokraste siajn lipharojn, mi kredas, ke mi fariĝus malfidela al li, tiom tiel li malplaĉas al mi.

Vere, viro sen lipharoj ne estas plu viro. Mi ne multe ŝatas la barbon; ĝi preskaŭ ĉiam mienas viro kiel vulgarulo, sed la lipharoj, ho la lipharoj! nepre necesas al vira fizionomio. Vere, neniam vi povus imagi, kiom tiu eta

harbroso sur lipo utilas al la okuloj kaj… al la… rilatoj inter geedzoj. Pri tio alvenis al mi amaso da pripensoj, kiujn mi ne preskaŭ aŭdacas skribi al vi. Mi volonte mallaŭte flustrus ilin al vi… en la orelon. Sed por esprimi iujn aferojn, la vortoj estas tiom malfacilaj por trovi, kaj iuj el ili, kiujn oni ne multe povas anstataŭi, prezentas sur la papero tiom malbelan figuron, ke mi ne povas skribi ilin. Kaj poste, la temo estas tiom malfacila, tiom delikata, tiom tikla, ke necesus senfina scienco por ektrakti ĝin sen danĝero.

Fine! Domaĝe se vi ne komprenas min. Poste, kara mia, provu iom subkompreni.

Jes, kiam mia edzo alvenis al mi razita, mi tuj komprenis, ke neniam mi povus adulti kun histriono aŭ predikisto, eĉ se li estus la pastro Didono, la plej alloga el ĉiuj! Kaj kiam pli poste mi troviĝis sola kun li (mia edzo), tio estis ankoraŭ pli malbone. Ho! Mia kara Lucia, neniam lasu kisi vin de viro sen lipharoj ; liaj kisoj havas nenian guston, nenian, nenian! Tio ne havas plu tiun ĉarmon, tiun bonguston kaj tiun… pipron, jes, tiun pipron de vera kiso, la lipharoj estas la pimento de la kiso.

Imagu, ke oni almetus sur viajn lipojn sekan… aŭ malseketan pergamenon. Jen la kareso de razita viro. Vere ĝi ne indas.

De kie venas do la logo de la lipharoj, vi diros al mi! Ĉu mi scias? Unue ili tiklas per agrablega maniero. Oni sentas ilin antaŭ la buŝo, ili pasigas tra la tuta korpo, ĝis la piedpintoj, ĉarman tremeton. Ili karesas, tremetigas kaj ekskuigas la haŭton, donas al la nervoj tiun ĉarman vibradon, kiu eligas tiun etan "ha!", kiel se oni frostus.

Kaj sur la kolo! Jes, ĉu vi jam sentis lipharojn sur via kolo? Tio ebriigas kaj agacas vin, malsupreniras en la dorson, kuras sur vi ĝis la pintoj de la fingroj. Oni tordiĝas, oni skuas la ŝultrojn, oni malantaŭen klinas la kapon ; oni samtempe volus fuĝi kaj resti; tio estas adorinda kaj incita! Sed kiom estas bone!

Kaj poste… vere, mi ne aŭdacas plu! Edzo kiu amas vin, sed tiam plene amas vin, scias trovi amason de etaj anguloj, kie li povas kaŝi siajn kisojn, etaj anguloj al kiuj ni apenaŭ pripensus tute sola. Nu, sen lipharoj, tiuj kisoj ankaŭ multe perdus siajn gustojn, ne konsiderante, ke ili fariĝus preskaŭ malkonvenaj! Klarigu tion, kiel vi povus. Pri mi jen la kialo, kiun mi trovis. Lipo sen lipharoj estas nuda kiel korpo sen vestoj; kaj vestoj, eĉ tre malmulte, ĉiam necesas!

La Kreinto (parolante pri tiuj aferoj, mi ne aŭdacas skribi alian vorton), la Kreinto prizorgis vuali ĉiujn ŝirmejojn de nia karno, kie devas kaŝiĝi amo. Razita buŝo ŝajnas al mi simili dehakitan boskon ĉirkaŭ ia fontano, kie oni iris trinki kaj dormi.

Tio memoras al mi frazon de politikisto, ĝi trotas en mia cerbo jam de antaŭ tri monatoj. Mia edzo, kiu sekvas la gazetaron, legis al mi iun vesperon diskurson ja bizaran de nia ministro pri agrikulturo, kiu tiam nomiĝis S-ro Melina. Ĉu li jam estis anstataŭita de alia? Mi ne scias.

Mi ne aŭskultis, sed tiu nomo Melina trafis min. Ĝi memoris al mi, mi ne tro scias kial, scenojn el la Bohemio. Unue mi kredis, ke temis pri koketa modistino. Jen kiel kelkaj vortoj el tiu oratoraĵo eniris en mian kapon. Do S-ro Melina alparolis Amienanojn, mi ja kredas, per tiuj vortoj kies sencon mi serĉis ĝis nun : " Ne estas patriotismo sen agrikulturo ! " Nu, tiun sencon mi trovis post momento ; kaj miavice mi deklaras, ke ne estas amo sen lipharoj. Tiel dirite, tio ŝajnas amuza, ĉu ne ?

Ne estas amo sen lipharoj!

"Ne estas patriotismo sen agrikulturo" asertis S-ro Melina; tiu ministro pravis, nun mi komprenas kion li volis diri!

Pri tute alia vidpunkto, la lipharoj estas ankaŭ ĉefaj. Ili determinas la fizionomion. Ili aspektigas vin milde, tenere, violente, aŭ kvazaŭ infanvorulo, diboĉulo, flirtemulo! La viro kun barbo, vera barbo, tiu kiu surhavas

siajn tutajn harojn sur la vangoj neniam havas delikatan vizaĝon, ĉar liaj trajtoj estas kaŝitaj. Kaj la formo de la makzelo kaj mentono multe diras al tiu, kiu scias rigardi.

La viro kun lipharoj konservas samtempe sian propran sintenon kaj sian delikatecon.

Kaj kiom tiuj lipharoj havas variajn aspektojn! Jen ili estas kuspaj, frizaj, koketaj; tiuj ŝajnas precipe ami la virinojn! Jen ili estas pintaj, pikaj kvazaŭ kudriloj, minacaj; tiuj preferas la vinon, la ĉevalojn kaj la batalojn.

Iafoje ili estas enormaj, pendantaj, teruraj; ĝenerale tiuj dikaj lipharoj trompkaŝas bonegan karakteron, bonecon kiu tuŝas al la malfirmeco, kaŝas mildecon, kiu proksimas al la timideco.

Kaj poste, tio kion unue mi tre ŝategas en la lipharoj, estas ke ili estas francaj, ja francaj. Ili venis al ni de niaj prapatroj la Galloj, kaj fine ili restadis la signo de nia nacia karaktero.

Ili fanfaronas, estas galantaj kaj bravaj. Ili afable malsekiĝas kun vino kaj scias ridi elegante, dum la larĝaj barbaj makzeloj estas mallertaj, kion ajn ili faru.

Vidu, mi memoras pri afero, kiu plorigis al mi ĉiujn miajn larmojn, kaj ankaŭ, mi nun rimarkas tion, ami la harojn sur la lipoj de la viroj.

Tio okazis dum la milito, en la patra domo. Tiam mi estis ankoraŭ fraŭlino, kaj iam oni interbatalis proksime de la kastelo. Jam matene mi aŭdis la kanonon kaj la fusiladon, kaj vespere germana kolonelo eniris hejmen, kaj enloĝiĝis. La postan tagon li foriris. Tiam oni venis por averti patron, ke estis multaj mortintoj en la ĉirkaŭaj kampoj. Patro levprenigis ilin kaj kunportigis ilin ĉe ni, por ke oni enterigu ilin kune. Laŭmezure, kiam oni alportis ilin, oni kuŝigis ilin ĉe la du flankoj de la granda avenuo de abioj. Sed pro tio ke ili komencis malodori; oni ĵetis teron sur la korpojn atendante, ke oni fosu grandan fosaĵon. Tiamaniere oni ekvidis nur la kapojn kun la okuloj fermitaj, kiuj ŝajnis eliri el la grundo, flavajn kvazaŭ la tero.

Mi volis vidi ilin; sed kiam mi ekvidis tiujn du grandajn liniojn de forlogaj vizaĝoj, mi kredis, ke mi tuj svenos; poste mi ekzamenis tiujn vizaĝojn, unu post unu, serĉante diveni, kio tiuj homoj estis kiam ili estis ankoraŭ vivantaj.

La uniformoj estis superkovritaj, kaŝitaj sub la tero, kaj tamen subite, jes kara mia, subite mi rekonis la francojn, pro iliaj lipharoj!

Iuj sin razis la tagon de la batalo, kvazaŭ se ili volus esti koketaj ĝis la lasta momento! Tamen ilia barbo iom rekreskis, ĉar vi scias, ke ĝi ankoraŭ kreskas post la morto. Aliaj ŝajnis razitaj jam de unu semajno; sed ĉiuj havis la francajn lipharojn, bone distingeblajn, la fierajn lipharojn, kiuj ŝajnis diri: "Ne konfuzu min kun mia barba najbaro, etulino, mi estas frato."

Kaj mi ploris, ho! Mi ploris pli multe ol se mi ne rekonus tiujn kompatindajn mortintojn.

Mi malpravis rakonti tion al vi. Nun mi estas malgaja kaj nekapabla pli longe babili.

Nu, adiaŭ, mia kara Lucia, mi tutkore brakumas vin. Vivu la lipharoj!

Johana La 31an de julio 1883

Esperantigis

Noĉjo Lagrafo (Francujo)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_
Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto, Chongqing, 400020, Ĉinio
Retadreso: vejdo@163.com
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ http://gazetejo.org/eo/penseo
◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_